# tejo:aktuale

n°500 | Januaro 2025

Karaj abonantoj, bonvenon al la nova jaro!

Kun granda ĝojo ni prezentas al vi ĉi-monate la jubileon de **TEJO-aktuale**, la **500-an eldonon!** Jes, jam **kvincent monatoj** pasis, dum kiuj ni portas al vi la plej freŝajn novaĵojn el la esperantista junulara mondo.

Ni kore dankas vin pro esti kun ni dum ĉi tiu tuta vojaĝo. Speciala danko iras al tiuj, kiuj estas abonantoj ekde la unua numero!

Januaro estas tempo por novaj komencoj, novaj ideoj kaj novaj energioj! Ni esperas, ke via jaro startis bone kaj ke vi estas preta por ĉiuj esperantistaj aventuroj, kiuj atendas vin. Ĉu vi jam partoprenis la plej freŝajn agadojn aŭ planas viziti eventojn ĉi-jare?

Dankon pro esti kun ni en ĉi tiu vojaĝo. Ĝuu la 500-an numeron, kaj ĝis la sekva eldono de **TEJO-aktuale**!

## EVENTOJ



**La 10-an de decembro 2024**, 70 jarojn post la Montevidea Rezolucio, esperantistoj el diversaj landoj kunvenis en Montevideo por festi la **longan kunlaboron inter Unesko kaj Esperanto**. Kvankam la ceremonio ne estis tiel granda kiel en 1954, ĝi restis historia. La evento inkluzivis artajn prezentaĵojn, prelegojn, filmojn kaj filmetojn, kaj estis ligo inter la pasinteco kaj estonteco de Esperanto, kun emfazo pri la rolo de junuloj. La konferenco substrekis la neceson de **daŭrigado de laboro pri homaj rajtoj, socia justeco, paco, egaleco, kaj la klimata krizo**, temoj kiuj estis same gravaj en 1954.

Legu pli en la ligilo: [https://www.tejo.org/la-historio-kaj-la-estonteco-renkontigis-en-montevideo/](https://www.tejo.org/la-historio-kaj-la-estonteco-renkontigis-en-montevideo/)




**BEMI proponas biciklan karavanon por IJK 2025.**

La itinero estas planita! Se vi volas aliĝi kaj kunbicikli parton (aŭ tuton) de la vojo,

kontaktu nin plej frue por ke ni povu renkontiĝi ie laŭ la itinero.

La celo estas starti el **Francujo** frue en la jaro kaj atingi **Ĝakarton** en Indonezio la 8-an de aŭgusto por IJK. Se la karavananoj malfruas laŭ la planita tempo, ni rajtigos nin uzi ian ajn veturilon (kun la bicikloj).

Se vi havas demandojn, proponon aŭ volas anonci vian partoprenon, skribu al <bemi-estraro@tejo.org>

# PROJEKTOJ




TEJO kaj la Konsilio de Eŭropo okazigas studsesion en Budapeŝto, kiu okazos de la **2-a ĝis la 7-a de februaro 2025**, ĉe la Eŭropa Junulara Centro. Dum ĉi tiu semajno, multaj junaj esperantistoj renkontiĝos kun aliaj junuloj el la tuta Eŭropo por partopreni diversajn laboratoriojn kaj agadojn, kiuj temigas **inkluzivecon, kontraŭdiskriminacion kaj homajn rajtojn**.

La studsesio estos unika okazo por interŝanĝi ideojn, lerni pri rajtbazitaj metodoj, kaj ricevi trejnadon, kiu ebligos al la partoprenantoj iĝi aktivaj defendantoj de homaj rajtoj en siaj komunumoj. Krome, interpretistoj faciligos la komunikadon: ĉiu sesio estos tradukita, permesante al la esperantista grupo flue kunlabori kun anglalingvaj partoprenantoj.

# ALVOKOJ




ILEI kaj TEJO invitas kandidatiĝojn por la premioj **"Juna Instruisto de la Jaro"** (35-jara aŭ pli juna) kaj **"Instruisto de la Jaro"** (pli ol 35-jara).

Kandidatoj devas montri regulecon en Esperanto-instruado, novigajn metodojn, internacian kunlaboremon, kaj kreemon. La gajnintoj ricevos atestilon, senpagan aliĝon al IJK kaj ILEI-Kongreso, membriĝon en TEJO kaj ILEI kun retaj revuoj, kaj librodonacon.

Kandidatiĝoj inkluzivu personan prezenton, atingojn, kontaktinformojn kaj, se eble, rekomendojn. Limdato: marto 2025; rezultoj estos anoncitaj en aprilo 2025 kaj oficiale proklamitaj dum la ILEI-Kongreso. **Limdato por kandidatiĝo/kandidatigo: fino de marto 2025.**

Sendu viajn proponojn al ilei.prezidanto@gmail.com!
Por pli da informoj: https://www.tejo.org/igu-instruisto-de-la-jaro/




**TEJO invitas kandidatiĝojn por Komisiitoj en diversaj Komisionoj**, kiuj kunlaboros kun Estraranoj por gvidi laboron laŭ la Realigplano kaj proponi novajn ideojn.

Kiel Komisiito, vi ludos gravan rolon en specifa fako, gvidante aktivulojn kaj projektajn taskojn, kaj tiel subtenos TEJO-n en ĝia misio por Esperanto kaj junularo.

Komisiitoj akiras profesian sperton kaj partoprenas en nova edukprogramo por plialtigi organizajn kapablojn. Taskoj inkluzivas planadon, varbadon, verkadon, kaj organizadon de eventoj. Sperto pri gvidado kaj organizado estas utila, sed ne nepra – la pozicio ankaŭ servas kiel trejnado!

Daŭre eblas kandidatiĝi! La pozicioj estas malfermitaj al ĉiuj membroj de TEJO kaj inkluzivas diversajn branĉojn kiel Edukado, Eksteraj Rilatoj, Teĥniko, kaj Daŭripoveco. **Laboru por junularo kaj Esperanto, dum vi kreskas persone kaj profesie!**

Pli da informoj en la ligilo: https://www.tejo.org/igu-komisiito-de-tejo-por-la-mandato-2024-2025/

**Ĉu vi ŝatus partopreni en esploro pri la uzo de Esperanto?**

Se vi aĝas 18 jarojn aŭ pli kaj se vi parolas Esperanton, vi povas partopreni en la esploro de Natalia Dankova de la universitato UQO (Kanado).

La enketilo estas anonima kaj enhavas **23 demandojn.**

Ek!: https://questionnaires.uqo.ca/index.php/154997?lang=en

## VENONTAJ EVENTOJ

**Ankoraŭ eblas aliĝi!** La Kataluna Esperanto-Junularo invitas vin al sia junulara Esperanto-aranĝo, kiu okazos de




la **20-a ĝis la 23-a de februaro 2025** en **Olot (Katalunio)**!

**RenKEJtiĝo** estas plurtaga evento por junaj esperantistoj el Katalunio kaj el la tuta mondo. Ni invitas vin aligi vin, por ĝui bonegan etoson, krei amikecojn kaj kune festi Esperanton!

Ĉi-jare estos eĉ pli speciala kialo por kunveni: ni festos la **40-an naskiĝtagon de KEJ**! Ne maltrafu!!

**Uzu tiun ligilon por aliĝi:**
https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLScnwjVMwOIyHW1YOILgoFRV-u1a5A1_xRVQN03cF2JYO6_2Ug/viewform




**Estas anoncitaj la ekskursoj de la Internacia Junulara Festivalo 2025!**

De la **17-a ĝis la 22-a de aprilo 2025** en **Torricella di Magione**, IJF ĉi-jare estos pli speciala ol iam ajn antaŭe, ĉar ni preparis pli da ekskursoj ol kutime!

Jen kion vi povos ĝui: unu **duontagan ekskurson**, unu **tuttagan aventuron**, kaj eĉ unu **postkongresan ekskurson**!

- **Unua ekskurso**: Esploru la ĉirkaŭaĵojn de **Lago Trasimeno**, unu el la plej grandaj lagoj en Italio kaj unu el ĝiaj plej allogaj naturaj lokoj. Malkovru la naturan belecon de ĉi tiu magioplena regiono!
- **Dua ekskurso**: Vojaĝu al **Perugia**, la ĉefurbo de Umbrio, kie vi promenos tra historiaj stratoj kaj mirindaj vidindaĵoj. Por dolĉigi la tagon, ni vizitos la faman fabrikon de **Baci Perugina**, kie vi malkovros la sekretojn de unu el la plej amataj italaj ĉokoladoj!
- **Postkongresa ekskurso**: Post la Festivalo, kunvenu kun ni al **Florenco**, la renesanca perlo plena de arto kaj historio. Perfekta maniero por fini vian IJF-aventuron!

Ĉu vi pretas? Aliĝu al ni por semajno de amuzo, kulturo kaj amikeco en la koro de Italio!

https://forms.gle/iP5sXfWQ1EsyTm5s8

**Marku viajn kalendarojn**, ĉar TEJO ĝojas anonci, ke la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en Cisarua, Indonezio! Aliĝi jam eblas!

Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!




Por la 500-a eldono de la novaĵletero de TEJO, ni decidis dediĉi unuan frazon de saĝulo al ĉiu signo, kiel bondeziron por la komenco de la nova jaro. Ĉi tiuj aforismoj celas doni al vi novan inspiron, profundaĵon kaj rivelon, kiuj helpos vin alfronti la novan jaron kun freŝa perspektivo kaj motivado.

La vortoj de la sagoj kaj iliaj filozofiaj pensoj kun sia amuza tono alportos al vi novajn ideojn por 2025!




♈ **La inspiraj vortoj por vi estas tiuj de saĝulo Flewik Zolmehd Juzean:**
"*La folio ne falas sen la vento, sed la vento ne ĉiam estas logika*"
Ŝafo kara, januaro petis vin ne esti tro obsedita pri detaloj. Pli bone iru laŭ la fluo kaj lasu la universon decidi.




♉ **Jen kion diris la saĝulo Ejlzod Fwenikh Mzulea:**

"*Se vi portas du ĉapelojn, unu el ili falu; se vi portas tri, nur la trian vi perdas*"
Bela Bovo, la etoso de januaro instigis vin sekvi nur vian pensmanieron, sed konsilado kelkfoje ankaŭ utilas, ĉu ne?




♊ **Kiel klarigis la saĝulo Lafzew Zihmelo Jkun:**
"*Kiam vi rigardas la oceanon, ne postulu ĉion el ĝi, se vi ne scias kie la fiŝo kaŝiĝas*"
Karaj Ĝemeloj, post januaro vi ne devas kapti ĉiun ŝancon, sed ĉiam zorgu, ke vi ne maltrafos la gravajn trajnojn de la vivo. Eble ili ne revenos. Sed ne tro zorgu. Nur

iomete.




♋ **La saĝulo Ejlzod Fwenikh Mzulea unu tagon pensis:**
"*Krabo ne moviĝas rapide, sed la maro en kiu ĝi estas jes*"
Kankro, januaro devigis vin malrapidiĝi kaj ripozi laŭ via propra ritmo. Ne ĉiu paŝo devas esti rapida, ankaŭ malrapidaj paŝoj portas grandajn ŝanĝojn.




♌ **Kiel diris la saĝulo Zlajwod Finkeh Muzel:**
"*Se vi brilas tro forte, la suno komencas senti sian povon ankaŭ*"
Leono, januaro postulas, ke vi briladu, sed memoru, ke estas aliaj, kiuj ŝatas la ombron. Kiam vi brilas, ne forgesu ne tro ombrigi iun. Tamen, sentu vin libera brili.




♍ **La saĝulo Hojlew Zaminf Kdezuz estas klara:**

"*Se vi estas preta, vi povas ĉirkaŭiri la mondon; se vi ne estas preta, vi povas ankoraŭ nur trinki kafon*"
Ho Virgulino, januaro postulis kuraĝon, sed ne tro! Eĉ kiam vi penas, ne forgesu, ke la vivo estas pli ol kalkulo.




♎ **Kiel antaŭvidis la saĝulo Flewik Zolmehd Juzean:**
"*Ne ĉiu fiŝo venas al via reto, ĉar reto havas truojn sed sen truoj ĝi ne estus reto*"
Amiko Pesilo, januaro alvokis vin al pacienco. Se vi ne provos, la fiŝo neniam estos la via: ĉu vi volas la fiŝon? Do iru kapti ĝin!! Kaj prifajfu la riskojn.




♏ **La saĝaj vortoj de Jolwik Zhamele Dufez sonas jene:**

"*La serpento ne mordas sen kaŭzo, sed foje ĝi estas nur embarasita pro la vespermanĝo*"
Sal' Skorpio... januaro estas tempo por ne mordi kiam ne necesas, eĉ kiam vi sentas minacon. Memoru, vi estas kiel plumo, kaj memoru manĝi bone.




♐ **Kiel diris la saĝulo Muzfel Zwedik Lohajn:**
"*Ĉiuj riveroj kondukas al la maro, sed se vi volas vojaĝi per boato, eble komencu per vojaĝeto en eta lago*"
Bonan jaron Sagitario: januaro alvokis vin al nova projekto. Sed memorigu al vi: vi ne povas aventurumi sen lerni ion antaŭe! Ĉu vi havas ĉion kion vi bezonas?

♑ **La saĝo de Kejmol Zawhid Fnezu**




**instruas nin:**
"*Se vi grimpas monton, ne rigardu la supron. La falo kelkfoje estas pli interesa*"
Bonan tagon Kaprikorno, januaro postulas paŝojn, sed ne forgesu, ke la vojo estas longforma kaj ne ĉiam rektelinia. Eble, malfermiĝu al novaj direktoj!




**♒ La saĝulo Zwenil Mofaduj Lekohz asertas:**
"*Muroj estas ĉiam paperaj*"
Akvisto, ho mia kara. Kvankam vi vivas en via akvuja mondo, ne forgesu, ke ekzistas vasta oceano de ebloj ekster via dimensio. Januaro instigis vin eliri el via komforta zono kaj malkovri la mondon. Sed ankaŭ memoru ke ĉiu nova mondo havas siajn novajn murojn.




**♓ La penso de Mufzel Hikjaw Zoden por vi estas:**
"*Se vi saltas en la akvon, vi ne ĉiam plonĝas, sed vi nepre estos malseka kaj ombrelo ne helpas*"
Fiŝoj, Fiŝoj, Fiŝoj... januaro donis al vi ŝancon agi sen tro da pripensado, sed se vi estas malseka, ne ploru pri ĝi. Ĉiu akvo havas sian propran bonan efikon. Sed ne restu malseka dum tro da tempo.

---




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands

INTUIT mailchimp